# BULTENO DE

## LABORISTA LIGO ESPERANTISTA EN ČEHOSLOVAKIO

JARABONO POR ČSR Kč 6,- POR EKSTERLANDO 4 RESPONDKUPONOJ POR MEMBROJ DE UNUIGITAJ LIGOJ "L.L.E." PLZEŇ KAJ "Č.L.A.E." ÚSTÍ N/L: SENPAGE.

POŠTĈEKA KONTO DE L.L.E. PLZEŇ 87.136 PRAHA DE Č.L.A.E. AUSSIG A/E: 45729 PRAHA

ADRESO LABORISTA LIGO ESPERANTISTA, PLZEŇ, PEKLO ČSR

12a jarkolekto. JANUARO 1938. Nr.1


## EL LA ESPERANTO MONDO !

FRANCIO:
En la urbo Desvres Esperanto estas nun instruata en la supera lernejo kun la aprobo de la lerneja inspektoro.

ITALIO:
Italaj maristoj lernas Esperanton. - La estraro de la "Marista Postlaboro ĉe la itala oceanŝipo" Conte Grande emetis en la planon de la instruado de fremdaj lingvoj ankaŭ Esperanton.

### Vintra sunturniĝo - jarŝanĝo !

Ricevinte ĉi tiun "Bultenon" falis la lasta folio de la kalendaro 1937. Pasis jaro plena da laboro, peno, idealismo por kultura movado, kiel estas nia esperantista.

J a r ŝ a n ĝ o !

Nova jaro komencas en nia historio. Nia gazeto eniras la 12an jaron.

Nova jaro, kun novaj laboroj, kaj ni diru la veron, kun la malnovaj zorgoj.

Je la lasta tago de la jaro estas kutimo danki al ĉiuj por farita laboro. Ni pensas, ke la sukceso de nia komuna laboro estas pli freŝa kaj eterna danko, ol skribita. Pro tio ni volas forlasi ĝin.

Jarŝanĝo! Favora momento apelacii al ĉiuj niaj ge-amikoj kaj legantoj por pli intensa kunlaboro je nia gazeto, pli vigla varbado k propagandado de nia kara internacia lingvo -

" E S P E R A N T O "

inter la tutmonda laboristaro.

Ni direktas ĉi tiun peton al ĉiuj lab. - ! esperantistoj sen diferenco de politika sintento kaj nacio. Ni estu varaj internaciistoj!

Kunhelpu je la fortigo de la laborista esperanto-movado. Kunhelpu efektivigi la proverbon: " Antaŭen ĉiam, malantaŭen neniam!"

En ĉi tiu senco ni deziras al ĉiuj gekdoj, amikoj enlandaj kaj trans la limoj, p r o s p e r a n k a j s u k c e s p l e n a n j a r o n 1938 !

Ni alten tenu komune la sangruĝan standardon kun la verda stelo !

L. L. E. - Plzeň
Ĉ. L. A. E. Aussig

La redakcio de la Bulteno.

IRLANDO:
La irlanda radio per siaj stacioj en Athlone, Dublin kaj Cork komencis aranĝi Esperanto-lingvan dis aŭdigon por konigi Irlandon kaj ĝian kulturon al la aliaj landoj.

BULGARIO:
La radio-stacio de Varna, komencis aranĝi Esperanto-lingvajn dis aŭdigojn.

ĈINIO:
Nova lab. Esperantogazeto aperis en Kanton Ĉia nomo estas "Internacia Solidereco kaj estas eldonata de la Sun-Jat-Sen Universitato.

BRITIO:
La 23an de Oktobro en la I.P.C.Kongreso /Internacia Pacmovado Brita sekcio/ oni diskutis pri propono por Esperanto. La kunveno aprobis la decidon kaj decidis, ke ĝia konstanta komitato pri studu la demandon de internacia helplingvo.

NEDERLANDO:
La fervojista kongreso en Utrecht decidis starigi esperantan rubrikon en la sindikata ĵurnalo.

## KATALUNUJO VOLAS ENKONDUKI E S P E R A N T O N KIEL DEVIGAN FAKON EN ĈIUJ LERNEJOJ:

La kontraŭfaŝista Esperanto komitato de Katalunujo sub la aŭspicioj de la Propaganda komisarejo de Kataluna Registaro, kreis komisionon por enkonduki Esperanton en la – lernejon, kiu komisiono, konsistanta el la plej eminentaj esperantistoj el Katalunujo, sen okupas je la prizorgado kaj esplorado de la problemo enkonduki Esperanton en la lernejon, ĉar evidentiĝis, ke Esperanto, kiel lingvo internacia, okupas jam longe gravan lokon en la kultura internacia movado en la mondo.

Katalunujo, batalanta por sia libereco kaj sendepeco kontraŭ la internacia faŝismo, ricevis kaj ricevis apogon moralan kaj materialan de la tutmonda esperantista movado.

Pro la fakto, ke jam Esperanto estas enkondukita en diversaj lernejoj en diversaj landoj, la kataluna esperantistaro trovas neces nun, spite ke ni troviĝas en la milito, en tuta Katalunujo enkontuki Espetanton, kiel devigan fakon. Ili volas, ke Katalunujo estu unu el la unuaj landoj el la mondo, kiu enkondukis tiun inter nacian lingvon, la bezon de la estonteco kaj la bazon de la paco.

Ni estas fieraj, ke la Kataluna Registaro kaj la tuta Kataluna popolo apogas tiun altan entreprenon por efektivigi en Katalunujo por la unua fojo la idealon de milionoj da esperantistoj en la tuta mondo.

El hispana esp. gazeto:

Ni scias Esperanton.

Sed ni uzas ĝin kiel internacian lingvon por faciligi niajn eksterlandajn interrilatojn, laŭ nia ideologia vidpunkto. Neutrala Esperantismo nenion signifas por laborista klaso. Neutrala esperantismo estas por la laboristo perdi la tempon, la klaskonscion kaj la stenton pri siaj propraj interesoj.

### A L V O K O

al ĉiuj eksterlandaj esperantistoj kaj esperantaj organizoj.

Okaze de Via jubilea laborista industria ekonomia ekspozicio kiu okazos dum la monatoj Julio kaj aŭgusto 1938 en Plzeň, aranĝos la lab.- ligo esperantista en Plzeň, sian Ian TUTLANDAN KONGRESON DE LAB. e s p e r a n t i s t o j en komence de la monato Julio 1938. Je tiu ekspozicio partoprenos ankaŭ laboristaj esperantistoj per sia propaganda

---

S U O M I - F I N N L A N D O - kompilis k-do Jozefo Pech. 1 /

---

Post kelktaga restado en Estonio inter afablaj ge-esperantistoj, la vagonaro transportis nin en Tallina haveno, kie estis lim kaj pasport ceremonioj kaj ni eniris en estonan ŝipon – Aegne – per kiu ni estis portanta pli ol kvar horojn trans Baltika maro al la blanka urbo de la Nordo, la ĉefurbo de la lando de la noktmeze suno H e l s i n k i . Nun starante sul la ferdeko, ni rigardas la viglan movadon en la haveno. Returnante al la maro, ni vidas super ĝi bluan ĉielon, kie moviĝas blankaj nuboj kun rapidaj mevoj. Momente mi rememoras, ke denove post dekkvin jaroj efektiviĝis mia sonĝo viziti la landon de dekmil lagoj /35.000/ la prikantata lando de la finna popolo, la lando de la noktmeza suno.

En Helsinki atendis nin k-do Väinö Ahde, kiu ankaŭ informis k-don Kostianer, kiu estis mia gvidanto antaŭ 15 jaroj. Vagadante tra la urbo kun finnaj ge-kdoj, mi rememoris, ke mi iam vizitis insulon Senasaari. K-do Kostianer min atentigis, ke mi ĝuste staras ĉe aŭtobusa haltejo, do ni decidis tien veturi insulon denove viziti. La insulo estas tre interesa, ĝi estas natura muzeo kun malnovaj finnaj boatoj kun domoj el antikva tempo kun interesa mezepoka preĝejeto, muelejo kaj multaj aliaj interesaĵoj. Sed plej bela aspekto estis kompreneble la malaperado de la suno sur akra nivelo, kiu estis tute nepriskribebla. /daŭrigota./

materialo, ĉar ni volas uzi la plej taŭgan tempon por propagando de
ESPERANTO EN LA LABORISTARO.
Por tiu celo sincere petas la ĉeĥoslovakaj laboristaj esperantistoj, ĉ i u j n e k s t e r l a n d a j n g e k a m a r a d o j n kaj esp. - o r g a n i z o j n same r e d a k c i o j n ,
S E N D I A L N I
t a ŭ g a n propagandan materialon pri la Esperanto movado en eksterlando.

Plej kore ni akceptas esperanto gazetojn, gvidilojn, broŝuretojn kaj aliajn esperantaĵojn.

La sendaĵojn bv. direkti al: Laborista societo esperantista en P l z e ň – P e k l o , Ĉeĥoslovakio kun noto:
EKSPOZICIO.

La redakcioj de esperanto gazetoj estas afable petataj, s e n p a g e r e p r e s i malgrandajn sciigojn pri nia peto en siaj gazetoj.

Dankon al ĉiuj!
R.Jonák

VIZITO DE S-ANO KOLA AJAYI EL A F R I K O en Plzeň.

Merkrede la Ian de dec. s.j. antaŭtagmeze alveturis el Č.Budějovice en Plzeň la negro s-ano Kola Ajayi, akompanata de s-ano Baroch, oficisto de ČAE-Praha, je Plzeňa stacidomo atendis la gastoj multaj plzeňaj esperantistoj. Post posttagmeza trarigardo de nia urbo, kiu al la s-ano tre plaĉis, vizitis vespere s-ano Kola Ajayi, s-ano Baroch kun esperantistoj el aliaj plzeňaj esp. kluboj, la societejon de la lab. societo esperantista, Plzeň-Peklo, kie estis la gastoj salutataj de multaj anoj, kiuj partoprenis la konversacian vesperon. La venontan tagon estis denove trarigardo de la urbo Plzeň /urbdomo tp./ kaj cirkaŭaĵo, kaj vespere okazis en la paroladejo de la urba muzeo lumbilda parolado de s-ano Kola Ajayi je temo: "Afriko, mia suna petrujo".

La paroladon, kiun s-ano Kola Ajayi parolis esperantlingve kaj estis tradukita ĉeĥlingve se s-ano J.Gross, estis vizitata de 230 personoj kaj havis grandan moralan sukceson. Je fino de la parolado kantis a-no Kola Ajayi du negrajn kantojn en la lingvo de sia patrujo kaj respondis je multaj demandoj, kiuj estis al li direktitaj el la aŭskultantaro. Vendrede la 3an de dec. matene forlasis niaj gastoj nian urbon kaj veturis al Praha.

R.Jonák

---

A M I K O , LEGU, LEGIGU kaj AGU laŭ JENAJ LINIOJ! Reportas: LLE.-Plzeň

Ĉar la nova jaro signifas por nia lab. sep. ligo novaj taskojn kaj novajn financajn elspezojn, ni afable petas ĉiujn niajn anojn kaj abonantojn plej baldaŭ sendi al ni la tiel malaltan ligan kotizon aŭ abonpagon. Vi ja ĉiuj scias, por ke la ligo bone propagandu la laboristan esperantistan movadon kaj aranĝu diversajn propagandajn entreprenojn, kiel nunjare nia "Ia TUTLANDA KONGRESO de LAB. ESPERANTISTOJ." Sed unue ni devas havi la necesajn financajn rimedojn, por havigi ilin al ni, vi helpas per tuja alsendo de via abonpago aŭ liga kotizo. Abonantoj kaj anoj de la ligo pagas po jare nur Kč 6,- per vortoj s e s ĉeĥ kronojn.

Ĉia laboro por nia malgranda, sed utila gazeto, estas farata s e n p a g e de niaj laboremaj ge-kdoj, tamen la elspezoj, papero, koloro, poŝtelspezoj ktp. estas sufiĉe grandaj.

PRO TIO: Al la ge-kdoj, al kiuj ebligas la financa situacio, subtenu la laboristan esperantan movadon per fortigo de nia

P R E S F O N D O .

Eĉ la plej malgranda sumo estas danke akceptata. Uzu pagante por ni la aldonitan poŝtpagilon de LLE – Plzeň, kontonr. 87 136 Praha. Sekretario R.Jonák.

---

NIA PRESFONDO; subtenata dum Nov. de jenaj ge-kdoj:

| | | |
|---|---|---|
| F.Hamal, Ullersdorf 67 | Kč | 4,- |
| J.Bergmann, Reinowitz | Kč | 15,- |
| F.R.Jonák, Plzeň – XI | Kč | 10,- |
| | Sume Kč | 29,- |

K I U S E K V O S ??????????????????????????

ADRESŜANĜO de nia redaktoro: K-do Ant.J.Ŝiller, transloĝiĝis al jena nova adreso, al kiu bv. direkti ĉiujn korespondaĵojn:
V a r n s d o r f – V.,
Am Graben nro. 1921. Ĉeĥoslovakio

R E C E N Z O :
X-a SOKOL OLYMPIADO, Praha 1938 ilustrita faldprospekto pri la festoj de la Ĉeĥoslovaka Gimnasta asocio SOKOL okazontaj en Julio 1938. 8 pĝ 15 x 10 cm. Senpage ricevebla ĉe: Ĉeĥoslovaka Esperantista Informejo Praha XIX Uralské 9. - ĉe la sama informejo aperis gvidbroŝureto 19 x 21 cm kun moto: "VIZITU ĈEĤOSLOVAKION".

R A P O R T O J :

Ĉ.L.A.E. ö Aussig – Nordbohema distrikto.
Al ĉiuj niaj ge-kdoj en Nordbohemio!
Kiel estro de nia distrikto mi deziras al ĉiuj gajan kaj feliĉan novan jaron kaj mi admonas ĉiujn pli vigle kunlabori en la venonta jaro, por ke nia lab.esp.movado baldaŭ trapenetriĝu la socialistan laboristaron. - Nia devizo: Pereiĝu la faŝismo kaj leviĝu la socialismo. Otto Danihelka estro de NBD.-ĈLAE.

ĈLAE – Langenaŭ.
La anoj de nia grupo estu atentitigataj, ke nia jarkunveno okazos la "24an de JANUARO 1938. La grupanoj ankaŭ estas petataj partopreni ek de la 3a de jan. 1938 je niaj komunaj kursvesperoj, ĉar partoprenos ilin niaj novaj kurspartoprenantoj. Prosperan novan jaron ni deziras al ĉiuj grupanoj.

La grupestro O.Dibelka

---

Laboro de Plzeňaj esperantistoj en la jubilea jaro.
Post duonjara prepara laboro estis en Plzeň fondita nova esp. - organizo, kiu organizas ĉiujn kvin esp. societojn en Plzeň en komuna propaganda laboro, sub la nomo: Okcident-Bohemaj esperantistoj labora kungrupiĝo por la propagando de Esperanto, sidejo en Plzeň, Č.S.R. La nova organizo aranĝis sian Ian ĝenerlan kunvenon sabate la 20an de Novembro a.j. en Plzeň. Post la raporto de la prepara komitato, aprobo de la statutoj kaj starigo de programo por la venonta jaro, estis elektita jena komitato: prez.: s-ano J.Gross, vicprez.: k-do F.Jonák, sekr.s-abo F.Kavan, kasisto: s-ano A.Wild, protokolisto s-ano Inĝ. R.,Novák, arĥivisto: s-ano V.Skála, revizoroj: ge-s-anoj F.Jonáková kaj Starý. La unua entrepreno kiun la nova organizo aranĝis estis la parolado de la negro s-ano Kola Ajayi en Plzeň. Ĉiuj plzeňaj esperantistoj nun post findiĝo de la nova esp. organizo esperas, ke komuna kunlabore de ĉiuj 5 societoj estos pli bona . R.Jonák

NI DANKAS por alsendo de jenaj gazetoj:
Informa Bulteno, nro 8 Barcelono, Esperanto eldono nro 24 de Generalitat de Catalunya, Barcelono,
Raci nin vokas, organo de la kom. Francio en SAT, nro. 2 -
Arbeider Esperantisten, Oslo, nroj 10/11, - Sennaciulo, organo de SAT, nro 458, raporto pri la 29a Universala Rsp. Kongreso en Varŝovio, leginda kaj interesa. BULTENO de AEF – Vieno nro. 10 Proleta Esperantisto, Mor. Ostrava nro. 9/1 – POPOLA FRONTO, nro.25 Valencia.

===================================

DEZIRAS KORESPONDI: K-do Johano Fernándes, str. Travesis, San Antonio, 35,I,I, BARCELONO
Hispanio.
Societo de lab. esperantistoj arenĝas letervesperonkomence de januaro 1938. Skribu multnombre. Respondo garantista. Adr.: K-do E.Sundsbye, Agathe Grondalsstr.12 OSLO, Norvegio.
ANTIFAŜISTOJ ATENDU! La esp. klubo la Hispana helpkomitato kaj la Faksindikata ĉeforganizo en Sodertajle, meze de januaro aranĝos ekspozicion antifaŝisman. Ni petas sendu prop. materialon, brosurojn, gazetojn, afulŝojn, insignojn ktpl. Ni resendos la aĵojn se dezirata. Adreso: Karl Axelsson, Dalgatan 7B nb. Södertälje, SVEDIO.
K-do Emile Tumler, Café Francais, BONSECOURS /Hainaut/ BELGIO dez. interŝ. PM. k.ĉ.1.

===================================

LETERKESTO DE LA REDAKTANTO:
Atingis min jam multaj gratuloj al la jarŝanĝo, ke neeblas respondi al ĉiuj individue. Mi ĉi loke plej kamaradece resendas ilin dezirante al ĉiuj miaj amikoj, prosperan kaj sukcesplenan novan jaron 1938. Ant. J. Schiller.
Al k-do Danihelka Langenaŭ: pro spacomanko devis mallongigi vian artikolon. Saluton.
Al k-do Hetmanek en Louky n.Olzou: Sendu unue 50 div. PM el OSRE, sendifektitaj kaj nur poste sendos al vi esp. gazetojn. Mi ne trompos vin, mi estas honest homo.
Ant.J.Schiller, Varnsdorf – V.Am Graben 1921 sendos por 50 sendifektitaj PM el ČSR esp. gazetojn. Sendu la PM anticipe. Ankaŭ PI mi sendas por PM. Represo de ĉi tiu anonco petata. --